

N. N. 32,
A spotless roze is growing
tradukita de N. N. 33

1. A Spotless Rose is growing,
Sprung from a tender root,
Of ancient seers' foreshowing,
Of Jesse promised fruit;
Its fairest bud unfolds to light
Amid the cold, cold winter,
And in the dark midnight.

2. The Rose which I am singing,
Whereof Isaiah said,
Is from its sweet root springing
In Mary, purest Maid;
Through God's great love and might
The Blessed Babe she bare us
In a cold, cold winter's night.

...

N. N. 32,
Rozbranĉo
forĝermadis
tradukita de Felix Ney

Rozbranĉo forĝermadis
el trunk' de nobelec'.
Prauloj jam kantadis:
de Jišaj ĝia spec'.
Floretom portis ĝi,
en akra vintro estis,
Je horo de noktmez'.

La branĉo anoncita
Jesaja de profet':
Maria netuŝita,
de kiu la floret'.
Eterne volis Di':
naskinta infaneton
Plej pura restis si.

De tiu eta floro
alvenas bonodor'
Ĝi brilas en la koro,
mallumon pelas for.
Homido, Dia Vort',
nin el sufero helpas,
De pek' Savant' kaj mort'.

...

N. N. 32,
Jen ĉiamviva
Rozo
*tradukita de Leland
Bryant Ross*

Jen ĉiamviva Rozo
laŭ vorto de profet'
El la Jišaja ŝoso
ekkreskis kun impet'.
Ĝi venis, hela Flor',
en frida tempo vintra
Je noktomeza hor'.

Jesaja ĝin anoncis,
la mencita Flor';
Maria ĝin responsis
el patrin-ama kor'.
Si naskis Rozon por
klarigi Dian amon
Je noktomeza hor'.

Ĉi tiu milda Floro
per sia dolĉ-arom'
Heligas per Digloro
la vojon de la hom'.
Ja homo, tamen Di',
ĝi ŝargojn malpezigas
Kaj homojn savas ĝi.

...

Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en la Anglan de N. N. 33.

Arg-618-1248 (2012-10-19 08:19:20)

*Tiu ĉi traduko troviĝas en [http://
ingeb.org/spiritua/esistein.html](http://ingeb.org/spiritua/esistein.html).*

Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en Esperanton de Felix Ney.

*Arg-618-1246 (2012-10-18
22:27:59)*

*Tiu ĉi Esperantigo troviĝas en la retejo [http://www.
reocities.com/cigneto/
thctxt/r/rozbrancx1.html](http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/r/rozbrancx1.html).*

Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en Esperanton de LELAND BRYANT ROSS (Ros’ Ha-ruo).

Arg-618-1247 (2014-09-08 13:06:28)

*Tiu ĉi traduko troviĝas en [http://www.reocities.
com/cigneto/thctxt/
j/jencxiamu1.html](http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/j/jencxiamu1.html).
Pluaj tradukoj de la sama aŭtoro troviĝas sub [http://www.reocities.
com/cigneto/thcbio/
r/ros_h.html](http://www.reocities.com/cigneto/thcbio/r/ros_h.html). Pri la tradukinto vidu la facebook-paĝon [https://www.facebook.com/
leland.ross/photos](https://www.facebook.com/leland.ross/photos).*